



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de la normandaj esperantistoj

NOVEMBRO 1992

n^o 175

(NS 90)

n^o 175

(NS 90) Redaktas: Pierre QUILLAUD. 16 rue Lt Vaisseau Paris
76120 Le Grand Quevilly . Tél.35 69 66 09

Kotizoj: 45 Frankoj .Union des Espérantistes de Normandie
C C P 283-40 H Rouen

Post longa silentado...

Vi devis atendi 8 monatojn antaŭ ricevi tiun bultenon. En marta numero, ni lanĉis helpalvokon por trovi novajn aktivulojn.

Malmultajn reagojn ni ricevis:

-Nia Honorprezidanto Maurice Huet, el Le Havre deziras ke nia unuiĝo daŭru sed demandas Kial? kaj opinias ke se pere de nia modesta bulteno, ni konvinkis niajn anojn ke ili nepre devas aliĝi al iu nacia aŭ internacia asocio, ni ne perdis tempon.

-Sro H. Rousseau el Caen opinias ke malfondo de UNE devus esti akompanata de konkretaj proponoj por agi alimaniere kaj de akcepto de respondecoj. Strukturo de UNE ne estas ideala sed ĝi tamen havas ege pozitivajn aspektojn: bulteno bonega ligilo inter ni, jaraj renkontiĝoj, iamaj statistikoj ĉio bone konsiderita, li opinias ke UNE pli valoras ol nenio kaj devus pluvivi subaze de strikta filozofia neŭtraleco.

-Fino Poupinet el Domfront tre bedaŭrus ne plu ricevi bultenon ĉar ĝi alportas al ŝi novaĵojn de normandaj geamikoj precipe ke Domfronta grupo ne plu kunvenas.

-Junulara Esperantista Franca Organizo aŭdis nian alvokon kaj subtenas nian agadon. JEFO estas preta kunlabori kun ni. Ĝi alvokas ĉiujn normandajn junulojn (malpli ol 30 jaraj) fariĝi membroj de JEFO. Patronaj membroj (pli ol 30 jaraj) estos ankaŭ bonvenaj.

Grava evento okazos en nia provinco dum Pasko 1993. Grupo de Herouville St Clair (apud Caen) organizos nacian kongreson kun pluraj centoj da partoprenantoj. Yves Nicolas estas la ĉeforganizanto. Pro tio, li ne plu povos prizorgi nian bultenon kies redaktoro li estis. Bonvolu do, ekde nun, sendi komunikojn, artikolojn al mi. Pro mia nesperto, la bulteno malpli bele aspektos... Mi petas vian indulgon..

Petro KIJŬ

+++++

Precipe dum somere oni praktikas Esperanton okaze de ferioj kaj internaciaj kongresoj.

Kelkaj Normandoj partoprenis en Vieno la 77an Universalan Kongreson sed fôĝesis sendi al nia bulteno siajn impresojn. Pro tio ni reproduktas artikolon de Maurice Merger el "Le Travailleur Espérantiste", organo de Fédération Espérantiste du Travail. Kvar Normandoj ĉeestis kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda en KAUNAS (Litovio-Lituanie); vi povos legi franclingvan intervjuon el "Le Signal du Grand Quevilly. Dro Berlot el Mont Saint Aignan ĉeestis Pacifikan Kongreson en Qingdao (Cinio).

Eble, aliaj membroj de nia Unuiĝo vizitis siajn gekorespondantojn
aŭ akceptis ilin hejme, aŭ partoprenis aliajn kongresojn (Fervojistoj?
Katolikoj?...)

Eble aliaj partoprenis staĝojn aŭ feriiis en Grésillon, Bouresse aŭ La Chaux de Fonds. Nia bulteno atendas viajn impresojn kaj raportetojn por venonta bulteno.

PRAKTIKUPRAKTIKUPRAKTIKUPRAKTIKUPRAKTIKUPRAKTIKUPRAKTIKUPRAKTIKUPRAKTIKUPRAK

OKoKo bezonas vin

✦ ✦ ✦ ✦ ✦ ✦ ✦ ✦ ✦ ✦ ✦ ✦ ✦

Organiz-Kongres-Komitato sendis al ni jenan komunikon:

Heróville Saint Clair grupo invitis SAT-Amikaron okazigi sian landan kongreson en nia provinco dum Pasko 1993 de la vendredo 9a ĝis la mardo 13a de Aprilo. La programo estos interesa kaj riĉa. Partoprenos pluraj centoj da kongresanoj. Organizado de kongreso estas tre grava laboro ; Heróville-Grupo bezonos helpojn de aliaj grupoj, precipe dum kongresaj tagoj.

Pro tio OKK petas ĉies kontribuon. Nepre rezervigu tiujn datojn kaj skribu tiuj ilin sur
vian datlibreton! Informu OKK ke vi pretas kunlabori skribante al :Yves NICOLAS ,1737 Quartier
du Bois 14200 Hérouville Saint Clair Tel. 31951181

Ne timu partopreni eĉ se vi ne parolas bone Esperanton. Ĉiuj povos partopreni, eĉ ne-membroj de la asocio.

[illegible]

LA 77A UNIVERSALA KONGRESO EN VIENO.

Dum la ferma kunsido, la prezidanto de la asista komitato sprite konstatis ke ĝi estas plurfoje rekordata : la plej granda kongresanaro ĝis nun en Okcidento, kun 3 032 partoprenantoj el 69 landoj, la plej rapide preparita, ĉar ĝi unue devis okazi en Prago, plie neniu alia urbo ol Vieno organizis kvarfoje la U.K.-on kaj ĝi estis ... la plej varma !

Eblas aldoni ke ĝi okazis en unu el la plej grandaj kaj luksaj kongresejoj, nome "Austra Center", sur la Danuba insulo kie estas, krom multaj kaj grandegaj salonoj por la diversaj kunsidoj, poŝtoficejo, monŝanĝo, bufeto kaj memservo kaj, tre grava avantaĝo, subtera parkejo por ni, senpaga dum la tuta semajno.

La kongresa temo "Komuna Eŭropa domo" animis dekon da kunsidoj. Laŭ prelego, kiun mi aŭskultis, tiu komuna domo tro facile akceptas la usonan modelon... Inter la kutimaj eroj, konversaciaj rondoj, internaciaj ekzamenoj, kunsidoj de la diversaj fakoj kaj fondaĵoj, menciindaj estas la afrika agado, la tagoj de la libro, de la lernejo kaj de la paco. La kunsidon de MEM lerte gvidis k-do Quietensky el Vieno, kiu trafe prezentis la nunan situacion en la orientaj landoj. Sekvis interesa diskuto, kiu montras ke la nova monda situacio ne favoras la pacon. Kaj tradicie la libro-servo prezentis grandan kvanton da literaturaĵoj.

Ankaŭ ne mankis la ekskursoj al interesaj lokoj, ekz. al Semmering kaj loko, kie telfero suprenirigas vin, je 1 000 m. pli supren, kapturniĝe en deko da minutoj, sur la monton Raĉ.

Multis la artaj kaj distraĵaj prezentoj. Tre moderna kaj interesa prezento tra la diversaj provincoj de Aŭstrio per dancoj kaj kantoj de la Aŭstra nacia vespero. Tre bona prezento de la teatraĵo "La gastejestrino" de Goldoni. Kabaredo de F-rino Barlaston, kiu havis grandegan sukceson. Pluraj pupateatraĵoj, el kiuj plej plaĉis al mi "Ombrelanco" el Japanio. Koncertoj de klasika muziko kaj gitaristoj el pluraj landoj. Improvizita koncerto tre sukcesa, internacia koruso, gitaristoj, kanto el Ĉinio, infana koruso, kaj denove "Barlastonaĵo" dum la Internacia arta vespero.

Menciinda estas ankaŭ la kongreso de la blinduloj, kiu okazis en alia kongresejo kaj ĉefe la infana kongreso, kiu okazis en Melk. Partoprenis trideko da infanoj, el 12 landoj preskaŭ ĉiuj denaskaj esperantistoj. De kelkaj jaroj, ĝi estas tre bone organizita de tre serioza teamo, helpata de kelkaj adoleskantoj. Kvankam modesta, tiu infana kongreseto firmigas la estonton de esperanto. Feliĉe, pri ĝi, raportis la Aŭstra televido.

Finiĝis la Viena U.K.; restas pripensi la sekvan en Valencio !

Maurice MERGER

Esperanto : voyage en Lituanie

Du 5 au 15 août, 3 adhérents de l'Amicale Bastié-Calmette-Salengro ont séjourné en Lituanie. La Lituanie est une des trois provinces baltes avec la Lettonie et l'Estonie qui ont acquis leur indépendance en 1990 après 50 années d'intégration forcée dans l'Union Soviétique. « Le Signal » les a interrogés pour connaître leurs impressions.

Le Signal : Pourquoi êtes-vous allés en Lituanie ?

Marie-Line désirait faire connaissance avec son correspondant lituanien.

Chantal voulait aussi rencontrer sa correspondante russe.

Quant à Pétro, il voulait revoir pour la troisième fois son amie de Saint-Petersbourg. La tenue d'un Congrès Espérantiste à Kaunas leur en a fourni l'occasion.

Le Signal : Quelles sont vos impressions sur la Lituanie ?

Nous avons eu l'impression d'un peuple heureux d'avoir retrouvé son indépendance. Vilnius et Kaunas sont des villes très jolies et très propres et nous n'y avons pas vu de misère.

Le Signal : La vie est-elle chère ?

Leur monnaie était encore le rouble, mais ils préparaient une nouvelle monnaie nationale. A l'époque, on échangeait 1 F. contre 25 roubles. C'est pourquoi les prix nous semblaient très bas et nous nous sentions riches. Par exemple, 1 kg de fromage valait 6 F., 1 litre d'huile 8 F., 1 kg de pain 1 F., un tube de dentifrice 1 F., 7 km en taxi 6 F.

Par contre, pour les ex-Soviétiques, c'était l'impression contraire car leurs salaires sont extrêmement bas. La correspondante de Pétro gagne 2.500 roubles, soit 100 F. par mois. C'est pourquoi les magasins ne manquent plus de marchandises : par manque d'argent, les gens n'achètent que l'indispensable.

Le Signal : Quels sont les traits caractéristiques de la Lituanie ?

C'est un pays très religieux, essentiellement catholique. Ils sont farouchement nationalistes et repoussent tout ce qui leur rappelle l'occupation russe et notamment la langue ; ils parlent tous en russe, mais les jeunes ne veulent plus apprendre cette langue dans les écoles. Mais alors, comment communiquer avec les deux autres pays baltes qui ont des langues très différentes ?

Le Signal : Parlez-vous maintenant du congrès auquel vous avez participé. Etiez-vous nombreux ?

617 personnes de 23 nationalités avaient adhéré au congrès. Les Baltes et les Slaves étaient les plus nombreux. Il n'y avait que 38 Français.

Le Signal : Quelle langue utilisiez-vous ?

Bien entendu, la langue internationale : l'Espéranto !

Le Signal : Que fait-on pendant 10 jours dans un congrès espérantiste ?

Nous avons participé à des débats, écouté des conférences telles que « Pourquoi la guerre en Yougoslavie ? », « La situation sociale actuelle en Tchécoslovaquie », « Comment combattre le machisme ? », « Les derniers jours de Romanov », « Le mouvement de libération nationale en Ukraine », etc.

Le Signal : Ce sont là des sujets bien sérieux !

Il y avait aussi des soirées récréatives : des concerts, des chansons, du théâtre, un récital poétique, des marionnettes. Et bien entendu, la partie touristique : nous avons visité Kaunas et la capitale Vilnius. Nous avons fait une excursion en bateau sur la rivière Njemen jusqu'à la mer Baltique. Mais le plus important, ce sont surtout les conversations avec les uns et les autres, sans interprète.

Le Signal : Et vous vous compreniez bien ?

Chantal : Très bien ! J'ai commencé à apprendre l'Espéranto il y a 2 ans. Je m'exprime beaucoup plus facilement

el LE SIGNAL du
Grand Quevilly

senpaga gazeto disdonita
en leterskatoloj dum

Oktobero 1992

dans cette langue qu'après 10 ans d'anglais !

Le Signal : On construit l'Europe. Ne serait-ce pas utile d'avoir une langue commune ?

Bien sûr, puisque c'est une langue précise, facile à apprendre. C'est la plus jeune des langues vivantes ; elle ne favorise aucun hégémonisme puisque neutre. Mais ce serait trop simple de l'adopter. Après avoir été interdite et persécutée par les régimes totalitaires, les autorités européennes refusent la solution la plus facile et la moins coûteuse.

Le Signal : Elles craignent peut-être de porter tort aux langues nationales ?

C'est ridicule ! L'Espéranto veut être une langue commune et non pas une langue unique ! On apprendra toujours les langues nationales pour les cultures qu'elles représentent. Et d'ailleurs, il est prouvé que l'étude préalable de l'Espéranto favorise l'étude ultérieure des autres langues.

Le Signal : Et maintenant, quand utiliserez-vous l'Espéranto ?

En 1993, des congrès sont prévus en Espagne, en Bulgarie... et aussi en Normandie à Hérrouville Saint-Clair à Pâques. Mais nous nous rencontrons aussi tous les jeudis entre 17 h.30 et 20 h. au Centre Socio-Culturel, car l'Espéranto est une des activités de l'ALBCS.

Le Signal : Y a-t-il des cours d'initiation ?

Si des personnes sont intéressées, elles peuvent s'adresser au secrétaire de l'amicale ou téléphoner au 35.69.66.09.



Rémy et Nicole LEBRUN.
58, route des Andelys.
27510 Pressagny l'Orgueilleux.
Près VERNON.

CARTES POSTALES DE COLLECTION
ET BROCANTE

Oni parolas la Internacian Lingvon
On parles la Langue internationale
"ESPERANTO"

Rendez-vous. Tél. 32 51 30 16

Jen
bela
poŝtkarto
eldonita
de
Normandaj
Geamikoj

LA VIVO EN LA GRUPOJ :

ROUEN-GRAND QUEVILLY:Groupe Esperanto Région Rouennaise ĉiam dormas pro foresto de Prezidanto sed Esperanto-fako de laika amikaro en Le Grand Quevilly kunvenas ĉiujlande vespere; ĝi estas samtempe konversacia rondo kaj perfektiga kurso.Regule vizitas la kunvenojn 14 gesamideanoj. Eks-membroj de Rùena grupo estos ankaŭ bonvenaj vizitante nin de tempo al tempo.

Kurso por komencantoj estis ankaŭ malfermata kun 3 gelernantoj.

CAEN-HEROUVILLE: Tiu grupo streĉas siajn fortojn por organizado de nacia kongreso dum Pasko 1993 . 11 membroj ĵus vojaĝis al Tiĥvin , ĝemela urbo de Hérouville kaj al Sankta Peterburgo kie ili estis varme akceptataj .

LE HAVRE : Regule kunvenas ĉiumonate la grupo. Jean Gibaux aktive partoprenas por organizado de SAT-Amikara kongreso.

LISIEUX : Gesinjoroj Martin ĉiam aktivas kaj okazigas kunvenojn kun fideluloj

YVETOT : Sinjoro Pottier malfermis perfektigan kurson kaj esperas baldaŭ instrui al komencantoj

GRAND COURONNE : Jogo grupo (yoga) havas esperantistan fakon.;ĝi klopodas por ĝemeliĝi kun simila grupo el Litovio (Lituanie).Urbestraro de Grand-Couronne pretas oficialigi tiun ĝemeligon.

SANKTA-PETERSBURGO : Tre aktivaj estas la grupoj de tiu belega rusa urbo. Barbara Cvetkova kiu vizitis nian regionon antaŭ 3 jaroj bone fartas malgraŭ tre malfacilaj vivkondiĉoj; ŝi salutas siajn konatulojn en Normandio. Valerija, ŝia filino ĉeestis SAT-kongreson en Kaunas ; ŝi instruas Esperanton kaj deziras gekorespondantojn por siaj lernantoj.

Aliaj grupoj kaj izoluloj : Informoj mankas. Izoluloj kaj grupestroj sendu
viajn raportetojn por venonta bulteno

[illegible]

KIE KONGRESI DUM 1993 ?

+++++

Vi studis la internacian lingvon por renkonti alilandanojn. Kongresoj estas idealaj renkontejoj. Tie vi povos trovi korespondantojn, aĉeti librojn, aboni revuojn...ktp...

Laŭ datoj, jen kelkaj gravaj eventoj kiuj okazos venontjare:

-48a Kongreso de SAT-Amikaro de la 9a ĝis la 13a de Aprilo en Hérrouville Saint Clair apud Caen. Programo kaj aliĝilo en venonta bulteno

-85a Franca Kongreso de Esperanto (UFE) de la 8a ĝis la 11a de Majo en PAU
Petu programon ĉe UFE. Aliĝilon vi trovos en tiu ĉi bulteno

-Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda de la 14a ĝis la 21a de Aŭgusto en Kazanlak-Roza Valo en Bulgario kaj Postkongreso de la 21a ĝis la 27a de Aŭgusto en Burgas-Slanĉevbrjag ĉe Nigra Maro
Informojn ĉe SAT 67 avenue Gambetta 75020 Paris

Universala Kongreso de UEA de la 24a ĝis la 31a de Julio en Valencio (Hispanio)

UFE antaŭvidas karavanon de Parizo al Valencio por antaŭkongresa semajno
Kontaktu Turisman Servon de Esperanto-France (UFE) 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

Kongresoj de aliaj asocioj: Katolikoj, Fervojistoj, ktp...Sendu al ni informojn por aperigo en nia bulteno.

Maison Culturelle de Grésillon, Centres culturels de La Chaux de Fonds (Suisse) de Bouresse kaj aliaj Feriejoj kaj stagejoj estas ankaŭ je via dispono!!!
KONGRESUKONGRESUKONGRESUKONGRESUKONGRESUKONGRESUKONGRESUKONGRESUKONGRESUKONG

JUNULOJ KAJ GEFILOJ DE ESPERANTISTOJ

Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO) vokas vin. Aliĝu tiun junularan asocion. Partoprenu ĝiajn aktivaĵojn. Petu bultenon kaj aliĝilon al JEFO
4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris. Gepatroj informu viajn gefilojn kaj pagu por ili kotizon!!!

85a FRANCA KONGRESO DE ESPERANTO
EN Pau de la 8a GIS LA 11 a de MAJO
 1993

KOTIZOJ (en francaj Franĝoj)		ĝis la 31/1/93		Ekde la 1/2/93	
	membroj	ne membroj	Membroj	ne membroj	
Kongresan(in)o	225	245	240	260	
Geedzoj	370	380	385	395	
Junuloj (sub 30 j.)	155	175	165	185	
Eksterlandanoj	senpage		senpage		

ALIĜILO:

NOMO

Antaŭnomo

Adreso: strato

urbo

poŝtkodo

Dato:

subskribo

Mi kunmetas ĉekon de F.... laŭ ĉi-supra tarifo.

Atentu: Faciligu nian preparon. Sendu frue vian kongreskotizon kun la aliĝilo
 (tiun folion eltiru, aŭ fotokopiu) kaj ĉekon al la sekva adreso:

ESPERANTO FRANCE (aŭ U.F.E.)/Nacia Kongreso

4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS